



PILO-PRESS

Internacia
Informservo

N-ro 10/1974 - 8 marto 1974

Aperas ĉiusemajne

Ĉu vi jam aliĝis al la
59a Universala Kongreso de Esperanto?



Eldonanto/Herausgeber:

Ludwig Pickel
Postfach 2113
D-85 Nürnberg 1
Tel. (0911) 46 36 49; 51 42 69

LE HAVRE-PRESSE

LE DÉJEUNER-CHOUCROUTE ESPÉRANTISTE



Le Havro (pp) 65 francaj esperantistoj kunvenis en Le Havro la 17an de februaro por ĝui "Reĝo-kukon" kaj por rigardi lumbildojn prezentitajn de la UEA-ĉefdelegito por Francio, M. Guillaume pri la savado de la monumentoj en la Nila vale, kiam estis konstruita la Assuan-akvobarejo. La supra foto el Le Havre-presse de la 18 feb 74 montras la ĉeestantojn de la regiona kunveno, kiun ĉeestis esperantistoj el Rouen, Yvetot, Grand-Quevilly, Pacy-sur-Eure, Fécamp kaj Les Andelys. Ankaŭ la gazeto Havre Libre raportis pri la kunveno. Raportis al Pilo-Pres A. Chalm, delegito pri informado de Le Havre kaj fidela P-P-leganto.

Novaĵoj pri la 59a UK en Hamburgo

Ĝus aperis Oficiala Komunikado n-ro 6. El ĝi ni citas:

Saluto de Kanceliero Brandt

La Federacia Kanceliero Willy Brandt, Nobel-premiito pri paco, afable konsentis saluti la Universalan Kongreson per mesaĝo presota en la Kongresa Libro.

Dua Bulteno baldaŭ aperos


Baldaŭ aperos la 32paĝa Oficiala Bulteno (dua), kiu estos sendita al ĉiuj ĝisnunaj aliĝintoj de la UK. La ilustrita kajero enhavos interalie detalojn pri la provizora programo, utilajn informojn pri Hamburgo kaj pri la Kongreso ĝenerale, priskribon de la loĝsituaĉio, ekskursoj kaj postkongresaj aranĝoj, kaj mendilojn por loĝado, bandedo, ekskursoj kaj postkongreso.

La Reĝa Kastelo

La apuda foto el "Trybuna Ludu" montras la nunan staton de la rekonstruata "Reĝa Kastelo" en Varsovio (Vidu PP 5/74 p.3)

La 22an de julio 74 la muroj kaj tegmentoj estu pretaj.

Dum sia lasta vizito en Varsovio Walter Scheel, ministro pri eksteraj aferoj de FRG, donace por la kastelo kunportis du portretojn de nekonataj artistoj de la 17a



Luty jest 25 miesiacem odbudowy Zamku Warszawskiego. W ciagu tego czasu zakonczono wznowienie murów, gotowe są wszystkie stropy nad pietrami z wyjatkiem skrzydla saskiego od strony Wisly. Na zdjeciu: panorama Zamku Warszawskiego. Fot. CAF - SZYPERKO

jarcento, kiuj prezentas princon Władysław Sigismund Wasa kaj Maria Kaziemira, la edzinon de reĝo Jan III Sobieski. La portretoj estas donaco de Federacia Respubliko Germanio por la rekonstruo de la Reĝa Kastelo.

Homoj kaj Nomoj

kun kaj sen Renomoj

Prof. D-ro Helmar Frank, direktoro de la Instituto pri Kibernetika Pedagogiko, Paderborn, Dipl.-psikologino Brigitte Meder-Schmidt, asistentino ĉe la sama instituto, D-ro Hans Kasselmann, docento pri matematiko kaj informatiko, kaj Hermann Behrmann, prezidanto de Asocio de Germanaj Esperanto-Instruistoj (AGEI), estis la partoprenantoj de gazetara konferenco en Bielefeld, la 6 marto 1974, al kiu invitis AGEI. Temoj de la gazetara konferenco, kiun ĉeestis 4 ĵurnalistoj de gazetoj kaj presagentejoj, estis: La aktuala situacio de Esperanto; Testorezultoj de Esperanto Programita; Prezento de 4voluma fontokolekto pri Kibernetika Pedagogiko de s-ino Meder-Schmidt; La lingvopolitikaj tezoj de Prof. D-ro Frank; Esperanto ĉe la 12a simpozio de la Societo por Programita Instruicio en Wiesbaden.

Ambasadoro Giorgio Bombassez de Vettor, itala reprezentanto ĉe Eŭropa Ekonomia Komuno, deklaris antaŭ nelonge, ke "se oni ne garantios similtanan tradukadon dum la debatoj kaj la rapidan tradukon en la italan de la labordokumentaj tekstoj, la italaj reprezentantoj ne plu partoprenos la kunvenojn."

Robert Kvasnak, Offenbach, gajnis la duan premion de la konstanta konkurso de Pola Radio pri la plej interesa letero dum februaro 1974.

U. Paul Ronald, prezidanto de Kanada Esperanto Asocio, informis, ke kanadaj esperantistoj starigis olimpikan komitaton por kuraĝigi la uzadon de Esperanto dum la Olimpiaj Ludoj 1976 en Montrealo.

Stanisław Świstak, prezidanto de Pola Esperanto-Asocio, kaj Andrzej Pettyn, ĝenerala sekretario de PEA, telefone interparolis kun Ludwig Pickel, eldonanto de Pilo-Press, pri kelkaj aktualaj Esperanto-problemoj. La telefona komunikado inter Varsovio kaj Nürnberg bonege funkciis.

Aŭskultantoj de Radio Zagrebo atentu! La Esperanto-elsendoj de Zagrebo ne plu okazas ĵaŭde, sed vendrede! Je la sama horo kaj ondolongo, do 5 minutoj post noktomezo sur meza ondo 264 m!

mi estas PELÉ



EDSON ARANTES DO NASCIMENTO

Ĉu Esperanto restu ekster la gol-linio?

Jes, oni devas sin demandi, ĉu Esperanto restu ekster la gol-linio, post kiam okaze de la Olimpiaj Ludoj en Munkeno 1972 kelkaj esperantistaj avanuloj driblis la pilkon, kvankam ili ne povis ravi la publikon per "diablaj dribloj" kiel la futbalreĝo Pelé. Sed post la Munkenaj Ludoj retiriĝis la avanuloj kaj iel la pilko estis pafita ekster la gol-linion. Kaj tie ĝi nun kuŝas.

Kio do nun estas farenda? Ĉu atendi iun estraran decidon? La Mondĉampionado pri Futbalo en FRG estas antaŭ la pordo, kaj jam pasis la duontempo de la estonta Olimpiado en Montrealo. Necesas sperta kaj lerta avanulo, kiu metas la pilkon sur la angulpunkton kaj reŝotas la pilkon sur la ludokampon. Kaj necesas pliaj avanuloj, halfoj kaj ankaŭ kelkaj arieruloj, sed ne tro multaj, ĉar en Esperantujo ni tro

multe ludas el la arierula linio. Defendi estas bone, pli bone tamen estas ataki.

Ŝajnas, ke nova teamo formiĝas. El Kanado oni aŭdas, ke stariĝis "olimpika komitato, por kuraĝigi la uzadon de Esperanto kiam la ludoj okazos tie-ĉi en '76". Kiu volas kunlabori kaj esti "golĉasanto" en Montrealo kontaktu S-ron U. Paul Ronald, Kanada Esperanto-Asocio, POB 174, Roxboro 900, Que., Kanado.

Sed necesas ankaŭ evoluigi la sportan lingvon en Esperanto. Malgranda estas ĝis nun la sporta literaturo en Esperanto. Fakte nur estas tri verkoj: 1) La Sporta Lingvo en Esperanto (Projekto) de Tibor Ujlaky-Nagy, kiu aperis en 1972 en eldonkvanto de 500 ekzempleroj. 2) Mi estas Pelé en la Esperanto-traduko de Francisko Almada, prezo 18,- GM. 3) Esperanto lingvo de la sporto Saluton amiko Konversacio inter Sportuloj de Ralph Harry, eldonita okaze de la Olimpiaj Ludoj 1972, prezo 4,- GM. Ĉu la lasta reaperos en prilaborita kaj plivastigita formo, ne jam estas certe. Tio dependas ĉefe de la kunlaboro kaj subteno de la esperantistoj. Mi estas Pelé kaj Esperanto Lingvo de la Sporto estas ankoraŭ haveblaj, mendu ĉe Libroservo Ludwig Pickel, 85 Nürnberg 1, Postfach 2113.

Eldonagado en Vjetnamo

Hanojo (mg) En Vjetnamo aperis pli ol 60 esperantaj libroj (ampleksantaĵe kune proksimume 9000 paĝojn) de 1959 ĝis 1973. Lastatempe venis nova informo, ke la Fremdlingva Eldonejo, Hanojo, komencis novan signifoplenan laboron - eldonon de Antologio de la Vjetnama Literaturo, kiu konsistas el pluraj volumoj. La unua volumo kun pli ol 600 paĝoj, dediĉita al la periodo de 10 - 19a jc., aperos ĉijare en eldonkvanto de 2000 ekz. Antaŭmendoj ĉe VPEA, 68 Ly Thuong Kiet, Hanoj, VDR.

Pilo-Press Internacia Informservo en Esperanto aperas ĉiusemajne Redaktoro Ludwig Pickel. Jara abonprezo 30,- DM, kun la germana eldono END 40,- DM.

Pageblecoj: Ludwig Pickel, 85 Nürnberg 1, Postfach 2113, Poŝtĉekkonto Nürnberg 819 56-851, Bayerische Vereinsbank Nürnberg 5.606.489 Schweizerische Volksbank, St. Gallen, 629 240/0, Österreichische Länderbank Bregenz 080.110.899/01/000

La Semajno en la Radio

Vieno. La sabata mallongonda elsendo ĉifoje estis bone aŭdebla. Ĝi komentis situacion de ÖVP, la aŭstria popola partio, okaze de ĝia partia kunveno en Linz, la aŭtoro de la komentario estis D-ro Macher. La dua parto de la elsendo aŭdigis raporton pri la ekspozicio de PR Ĉinio en Vieno el la plumo de d-ro Beckmann. La du Esperanto-parolistoj estas d-ro Beckmann kaj Emil Vokal.

Zagrebo. La Zagreba elsendo, la lasta en februaro, post la kutimaj novaĵoj el Jugoslavio, respondis al korespondantoj kaj menciis ricevitajn periodaĵojn. Emiljia Lapenna recenzis la novaperaĵon el Jugoslavio "G. Marin vizitas sian hejmon - la mondon". Estonte la elsendo okazos ne plu jaŭde, sed vendrede, la venonta do la 8an de marto.

Berno. Lunde oni foje aŭdis virinan voĉon, nome d-rinon Heide Baur, kiu parolis pri la restarigita Esperanto-movado surbaze de 5 numeroj de la nova portugala Esperanto-revuo. La revuon ŝi ne ricevis el Portugalio, sed de aŭskultanto el Vieno. Venontan lundon d-ro Arthur Baur dadrigos siajn prelegojn pri la alpoj. - Gesroj Gacond prezentis la nunan situacion de la araba lingvo en la mondo kaj en UN surbaze de artikolo en la revuo "Esperanto". Pravigis denove mia tezo, ke la araboj "naŝas en mono". Ili eĉ povas pagi al si la lukson, ke la araba estu oficiala kaj labora lingvo en UN, por kio ili - la arabaj landoj - devas pagi milionojn da dolaroj.

Romo. Post longa serĉado mi trovis la dimanĉan E-elsendon el Romo neatentinde sur la ondolongo 49 m kaj 50 m. Sed kompreni mi povis nenion pro la mallaŭteco kaj ĝenado fare de aliaj stacioj. Estas vere bedaŭrinde, ke tiu stacio suferas pro tiuj preskaŭ regulaj teknikaj malavantaĝoj.

Varsovio. La 4an de aprilo 1974 La Esperanto-elsendoj de Radio Varsovio festos sian 15an datrevenon. Ekde 15 jaro de Radio Varsovio elsendas en Esperanto. Estus dezirinde, se la Esperanto-redakcio okaze de tiu jubileo ricevu multajn gratulojn, leterojn kaj poŝtkartojn. Pilo-Press do petas multnombre skribi al Pola Radio, Esperanto-Redakcio, P.O.B. 46, PL-00-950 Warszawa 1, Pollando. La Esperanto-revuo estas petataj atentigi ankaŭ siajn legantojn pri tiu jubileo! Vidu ankaŭ PP n-ro 5/1974, p. 2.

Dum februaro la Esperanto-redakcio ricevis entute 165 korespondaĵojn, nombro relative malgranda laŭ la opinio de la redakcio. Aliflanke kreskis la intereso de aŭskultantoj pri polaj temoj kaj politikaj komentarioj. La dimanĉa "Panoramo de internaciaj eventoj" traktis jenajn temojn: La diplomatia agado en la Proksima Oriento pri separo de la militaj fortoj sur Golan-montoj; polaj-algeriaj interparoloj en Varsovio; disvolvo de la polaj ekonomiaj rilatoj kun eksterlando; polaj-finnaj interparoloj en Varsovio; Eŭropaj aferoj, la situacio en la Eŭropa Komuno, la rezultoj de la britaj balotoj; la politika situacio en Ĉilio. Aŭtoro de la panoramo estis Leonid Abolnik. La Esperanto-Ekspreso temis i.a. pri prelegoj de Hugo Kraus el Vieno en Szczecin, pri la 4a eldono de la lernolibro "Ĉu vi parolas esperante" de A. Pettyn nun havebla en polaj librovendejoj. Ne mankis la rubrikoj "Niaj aŭskultantoj sciigas" kaj "Novaĵoj de Pilo-Press". Krome ni aŭdis, ke la 23 feb 74 en Berlino kunvenis la estraro de Centra Laborrondo Esperanto en GDR. Oni parolis pri la preparado por la tutlanda Esperanto-kongreso en Berlino la 1 kaj 2 junio 74 kaj pri novaj taskoj rezultantaj el la nova situacio post la tutmonda rekonno de GDR. Dum la kongreso A. Tomecki prezentos sian Varsoviajn spektaklon. Ĉu la agado por la Olimpiaj Ludoj 1976 en Montrealo evoluos laŭ la intervjuo kun ambasadoro Ralph Harry farita dum la kongreso en Beogrado, dependas nun de la esperantistoj. Cetere la ĉeftrejnisto de la pola piedpilka teamo pozitive sintenas al Esperanto.